

# *Bulgara* **ESPERANTISTO**



|       |                                                                                                                                                                                        |     |
|-------|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|-----|
| * * * | Призив към българските учители (Alvoko al la bulgaraj instruistoj, akceptita de la partoprenantoj en la Someraj Porinstruistaj Esperanto-Kursoj en Burgas — 1—20 de aŭgusto 1972)      | 1   |
|       | <b>Ardvids Grigulis.</b> Gloro oktobra. Tradukis Elvira Lippe                                                                                                                          | 3   |
| * * * | Rezolucio de la 38-a kongreso de BEA                                                                                                                                                   | 3   |
| * * * | Заповед № 2567 на Министерството на народната просвета (Ordono de la Ministerio de la Popola Instruado n-ro 2537)                                                                      | 6   |
|       | <b>Dimitr Mutușev.</b> Nova paŝo de Esperanto en la internacia turismo                                                                                                                 | 8   |
|       | <b>Vera Kirilova.</b> Ekskurso al Trojan-Balkano                                                                                                                                       | 8   |
|       | <b>Marin Băcev.</b> Al la Someraj Porinstruistaj E-Kursoj en Burgas                                                                                                                    | 8   |
| * * * | Задочни kursove po esperanto za učiteli (Foreŝtaj kursoj de Esperanto por instruistoj)                                                                                                 | 10  |
|       | <b>Ĉeestinto.</b> Impona Esperanto-aranĝo en Hungario (Hungara Kultura Festivalo)                                                                                                      | 11  |
|       | <b>Kunĉo Vălev.</b> Instruistaj E-aranĝoj enkadre de la Hungara Kulturfestivalo (1. La VI-a Kunordiga Konferenco por Enkonduko de Esperanto en la Lernejojn. 2. La konferenco de ILEI) | 12  |
|       | <b>Kolomano Kaloczay.</b> Al la bulgaraj esperantistoj                                                                                                                                 | 14  |
|       | <b>Akademiano Georgi Naĝakov.</b> Esperanto kaj la bezono pri facile ellernebla internacia lingvo                                                                                      | 14  |
| * * * | 58-a UK de Esperanto: Beograd ĉe la du riveroj                                                                                                                                         | 15  |
| * * * | Internacia sukceso de niaj artistoj-esperantistoj                                                                                                                                      | 16  |
| * * * | 10-jara jubileo de utila laboro                                                                                                                                                        | 16  |
|       | <b>N. Sigal.</b> Esperanto-kursoj en Odesa                                                                                                                                             | III |

### Sur la kovrilpaĝo:

La C-grupanoj en la Someraj Porinstruistaj Esperanto-Kursoj en Burgas (vd. paĝon 8)

*Abonkotizo: iara — 1,40 levoj. Por eksterlando — 4,28 lv., 5 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta numero — 0,14 lv.*

*Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm<sup>2</sup>; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespondanconoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.*

### EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

**ITALIO:** Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

**RUMANIO:** Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bukaresti 5.

**KOREO:** Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. keŝto 16.

**SOVET-UNIO:** Ivan Palkin, ul. Ŝvernika, D. 7, kor. 3, kv. 44, 117 449 Moskva V-449.

**NEDERLANDO:** Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

**SVEDIO:** Karl Kvist, Deje, Box 109.

**П Р И З И В**

*към българските учители, приет от учителите-участници  
в летните учителски есперантски курсове в Бургас  
(1—20 август 1972 г.)*

**ДРАГИ КОЛЕЖКИ И КОЛЕГИ,**

Съвременните международни отношения — политически, стопански, културни, научни, спортни, туристически и др., създават все по-оживени връзки и контакти между хората от всички страни и континенти. Успоредно с това все повече нараства и необходимостта не само специалистите, но и обикновените граждани да владеят езиково средство за общуване с хората отвъд границите на своята страна. Наред с езиците на големите нации, които се използват като такова средство, международният език есперанто играе все по-голяма роля. Той се изучава и използва във всички страни на света, в резултат на което се създаде демократичното миролюбиво движение на есперантистите.

В нашата страна есперантското движение има стари традиции, но истински размах то получи през годините на народната власт. Днес у нас есперанто се изучава в граждански курсове от хиляди трудещи се, в около 100 училища — кръжочно и факултативно, както и в Софийския университет „Климент Охридски“, във Висшия педагогически институт в Шумен, във Висшия институт за народно стопанство във Варна, във Висшия икономически институт в Свищов.

За да се подготвят измежду професионалните учители по-голям брой преподаватели по езика есперанто за училищата и ръководители за гражданските курсове, Учителската секция и Софийският окръжен комитет на Българския есперантски съюз уреждат ежегодно 6-месечни задочни курсове по есперанто през учебната година и 20-дневни присъствени курсове през лятото.

Ние, 125 учители, събрани от цялата страна в тазгодишните летни учителски есперантски курсове в гр. Бургас, кв. „Меден рудник“, след приключване на учебните занятия обсъдихме на общо събрание учебно-методическата и организационната страна на курсовете и дойдохме до следните заключения.

Благодарение на мерките, взети от ръководството на курсовете, и на помощта, оказана от Министерството на народната провета и на окръжните отдели „Народна просвета“, в това число специално на отдел „Народна просвета“ в Бургас, бяха създадени добри условия за обучение, храна, квартира и почивка край морето.



Обучението в курсовете се водеше на високо методично и езиково равнище, по одобрена от МНП програма съгласно съвременните научни изисквания за изучаване на чужди езици. Като лектори бяха привлечени добре подготвени педагози-есперантисти от страната и чужбина като Кунчо Вълев — хонорован преподавател по есперанто в Софийския университет, доцент Георги Димов от Варна, Цанко Мургин — преподавател по есперанто във Висшия педагогически институт в гр. Шумен, Геза Куруч — методик-езиковед от Унгария, и др.

С участието на курсисти от Унгария, Полша и ЧССР тая година неспринудено се създаде благоприятна среда за изучаване на есперанто, за практическото му приложение и за създаване на приятелство и братска дружба между нас.

Потвърди се още веднъж, че е извънредно полезно за учителите да изучават през учебната година есперанто задочно, а през лятната ваканция да продължат в летните присъствени курсове. С това се осигурява по-добрата им подготовка за преподаватели по международния език.

Значението на задочните и присъствените курсове се увеличи извънредно много, след като МНП издаде нова учебна програма за факултативно и кръжочно изучаване на есперанто в училищата. За прилагането на тази програма са необходими добре подготвени учители-есперантисти.

Ние, учителите, участвуващи в тазгодишните летни учителски есперантски курсове, даваме висока оценка на това национално мероприятие на Българския есперантски съюз и като изказваме гореща благодарност на МНП за неговата помощ и грижи за разпространение на есперанто сред учителите и учащата се младеж,

#### ПРИЗОВАВАМЕ

всички колеги-учители масово да се включат в 6-месечните задочни и 20-дневните присъствени курсове за подготовка на преподаватели по международния език есперанто.

Чрез есперанто ние, българските учители, ще дадем своя принос за осъществяване на миролюбивата политика на Българската комунистическа партия, като чрез езика активно съдействуваме за възпитанието на нашите ученици в дух на международно разбирателство и сътрудничество.

Есперанто е много добро практическо средство за патриотичното и интернационалното възпитание на нашата младеж, за популяризиране в чужбина на нашата национална култура и изкуство, красотата на нашата Родина и нейната привлекателност като обект на международния туризъм, огромните успехи на нашия народ в изграждането на новия щастлив живот у нас.

гр. Бургас, кв. Меден рудник  
19 август 1972

*От участниците в летните учителски  
есперантски курсове*

---

*BAZA DEVO DE ĈIU ESPERANTISTO estas ricevi kaj legi nian asocian organon. Ĝi donas interesan kaj utilan legaĵon por ĉiuj — organizaj agantoj de BEA, ordinaraĵ membroj de la E-societoj, kursguidantoj, novaj esperantistoj, infanoj.*

*Abonu SENPROKRASTE „Bulgaran Esperantiston“ ce la poŝto!*





# POEZIO KAJ BELETRO

*Arvids Grigulis*

*latva poeto*

## GLORO OKTOBRA

Gloro oktobra — roz' ruĝa kaj ĉarma,  
ardas en vasto de l' mond'.  
Venas jarcentoj, forpasos jarcentoj,  
ardos la roz' en estont'.

Povas pluvegoj kotigi ĉi teron,  
flami militfurioz'.  
Sankta, floranta dum jaroj, epokoj  
vokas al venko la roz'.

Ĝi al stelaro la vojon direktas,  
lumon ĝi portas kun si.  
Por ne postresti ĝi ĉiun instigas,  
ĉiu prosperu — kaj vi.

Flamas la rozo en neĝo kaj ŝtormo,  
floras en koroj la bel'.  
Ŝagon de senco kaj penso kuraĝa  
ĵetu vi foren, al cel'.

*El la latva: Elvira Lippe*

## 38-a Kongreso de BEA

### REZOLUCIO

DE LA 38-a KONGRESO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO  
okazinta la 3-an — 4-an de julio 1972 en Smoljan

La 38-a Kongreso de la Bulgara Esperantista Asocio, okazinta en la tagoj de tutpopola celebrado de la 90-a datreveno de l'naskiĝo de Georgi Dimitrov, post profunda pridiskuto de la raporto de l' Centra Komitato de la Asocio pri la 4-jara interkongresa periodo, unuanime aprobas la raporton, la faritajn en ĝi pritaksojn kaj konkludojn, kiel ankaŭ la skizitajn antaŭstarantajn taskojn.

La Kongreso kunsidas en rimarkinda momento de la disvolviĝo de nia Patrolando: estas realigata la grandioza tasko, metita de la nova Programo de Bulgara Komunista Partio, aprobita de ĝia Dekaj Kongreso — konstruado de evoluanta socialisma socio en nia lando.

Por la solvo de tiu ĉi senpera historia tasko abnegacie klopodas ankaŭ la bulgaraj esperantistoj. Ili fieras, ke per sia laboro helpas la proksimiĝon de Bulgario al la komunisma estonteco.

Popola Respubliko Bulgario, kune kun Sovetunio kaj aliaj frataj socialismaj landoj, firme kaj konsekvence gvidas politikon por garantiado de la paco en la mondo, strebante al estingo de la militfajrujoj en Sudorienta Azio kaj Proksima Oriento, kunvoko de tuteŭropa konferenco por sekureco kaj kunlaboro, kreo de plej favoraj internaciaj cirkonstancoj por konstruado de la socialismo.

La Kongreso konstatas, ke dum la raportata periodo la bulgaraj esperantistoj notis vicon da sukcesoj en sia agado, plenumante la decidojn de la 37-a Kongreso de BEA. En sia tuta laboro ili estis gvidataj de la saĝaj indikoj de la Bulgara Komunista Partio, de la decidoj de ĝiaj Naŭa kaj Dekaj Kongresoj, montrinte ankoraŭ unu fojon antaŭ nia socio, ke la Bulgara Esperantista Asocio inde okupas sian lokon en la sistemo de la politika organizado de l'socialisma socio, estas profunde fidela al la socialisma kaj komunisma idealo, aktive mobilizas milojn de siaj membroj fordoni fortojn kaj energion en la tutpopola politika kaj labora antaŭeniro por konstruado de maturiĝinta socialisma socio, faras utilan per Popola Respubliko Bulgario laboron en la popularigo de ĝia pacama politiko, konigante ekster la limoj de la patrolando ĝiajn konsiderindajn sukcesojn en la konstruado de la nova vivo.

La Kongreso konstatas kun kontento, ke dum la raportata periodo la bulgaraj esperantistoj disvolvis varian agadon honore al la Bulgara Komunista Partio, por la edukado precipe de la junaj esperantistoj en spirito de fideleco al la afero de la partio-gvidanto. Ili partoprenis en la celebrado de vico da gloraj datrevenoj—25 jaroj de la Naŭseptembra Revolucio, 80 jaroj de la fondiĝo de revolucia marksisma partio en Bulgario, 100-jara jubileo de la gvidanto de la laboruloj el la tuta mondo kaj fondinto de la soveta ŝtato Vladimir Iliĉ Lenin, 90-a datreveno de l'naskiĝo de la elstara aginto de la internacia komunisma kaj laborista movado, fondinto de nia popoldemokratia ŝtato, nia gvidanto kaj instruanto Georgi Dimitrov.



Honore al la Deko Kongreso de la Bulgara Komunista Partio estis realigitaj vico da iniciatoj de loka kaj nacia signifo.

La bulgaraj esperantistoj aliĝis en la diskutado de la projekto pri nova partia programo kaj pri nova konstitucio de Popola Respubliko Bulgario. Ili partoprenis amase en la balotoj por la Parlamento kaj en la referendumo por aprobo de la Konstitucio.

En diversaj forumoj de la internacia Esperanto-movado la esperantistoj de Bulgario digne prezentadis sian patrolandon kiel landon kun brile reliefta kaj konsekvence efektivigata pacamo, ekupitan entute per paca konstrua laboro por plialtigo de la materiala kaj spirita kulturo de la popolo, de ĝia bonstato.

Per sia aktiva partopreno en la laboro de la internacia Esperanto-movado la bulgaraj esperantistoj helpas por la plialtigo de ĝia aŭtoritato, plifirmigas la prestiĝon de la Bulgara Esperantista Asocio kaj plifirmigas la Mondpacan Esperantistan Movadon.

La Kongreso kun kontento notas, ke konsiderinde plivastigis kaj pliboniĝis la ligoj de la Bulgara Esperantista Asocio kun la esperantistaj asocioj kaj movadoj el la socialisma tendaro. Eksterordinare intimaj estas niaj ligoj kun la sovetaj esperantistoj.

Vice kun tiuj ĉi sukcesoj la Kongreso opinias, ke en sia agado la Centra Komitato, la distriktaj komitatoj kaj la societaj estraroj allasis ankaŭ seriozajn malfortojn kaj malperfektaĵojn, kiuj embarasis la organizon plikreskon de BEA, la gvidadon de pli amasa kurslaboro, la kreon de novaj esperantistoj kaj ilian aliĝon al la organizita Esperanto-movado.

Multaj el la mezaj kaj malsuperaj organoj de la Asocio allasis neorganizitecon, ne planis sian antaŭstarantan laboron, subtaksis la signifon de la financa kaj statistika akurateco.

Ne ĉie oni konceptis la rolon kaj la specifecon de la junularo, precipe de la laborista junularo, kaj pro tio oni nesufiĉe laboris por ĝia altiro en la esperantajn kursojn kaj en la vicojn de BEA.

La klopodoj de la Centra Komitato kaj de la ceteraj organoj kaj organizaĵoj en la sfero de la ideologia laboro ne estis sufiĉe efikaj. Nesufiĉa estis la konkreta helpo, kiun CK donis al la distriktaj komitatoj kaj societoj. Ankoraŭ estas oftaj la elementoj de malvasta praktikismo, kiu estas serioza malhelpo por sistema kaj rezultoplena idea-politika laboro por la edukado de l'esperantistoj en spirito de socialisma patriotismo kaj proleta internaciismo.

La asocia organo „Bulgara Esperantisto“ daŭre aperadis kun granda malfruigo, ne publikigis sufiĉe da materialoj por la novaj esperantistoj, ĝia poligrafia formiĝo ne estis je la necesaj nivelo.

Por ke la estonta agado de la Centra Komitato, de la distriktaj komitatoj, de la estraroj de l'specialigitaj sekcioj kaj de la societoj povu fariĝi ankoraŭ pli aktiva kaj venku la allasitajn malfortojn kaj malperfektaĵojn, la 38-a Kongreso de la Bulgara Esperantista Asocio

### DECIDAS:

1. Devigas ĉiujn gvidorganojn de supre ĝis malsupre plibonigi sian stilon kaj metodon de gvidado kaj doni pli sisteman kaj pli energian helpon por plifirmigo kaj stabiligo de la vicoj de BEA, kiel unuagrada kondiĉo por plialtigo de la nivelo de ĝia ĉiuflanka agado.

2. Oni alcelu la atenton de ĉiuj asociaj organoj kaj organizaĵoj al pli aktiva altiro de junaj laboristoj, oficistoj, specialistoj, lernantoj kiel membroj de la societoj, por certigi ligojn inter la diversaj generacioj en la esperantista movado kaj naturan kontinuecon en la formiĝo de l' aktivularo.

3. La distriktaj komitatoj zorgu pri altiro de instruistoj en la kursojn de Esperanto, por prepari el ili instruspecialistojn necesajn por la plua normala disvolviĝo de la esperantista movado en Bulgario.

4. La distriktaj komitatoj organizu distriktajn, interdistriktajn kaj regionajn renkontiĝojn, festojn, celebroy de datrevenoj, ekskursojn, konsiliĝojn pri diversaj demandoj de la esperantista agado, interŝanĝu pozitivajn spertojn en la laboro de la komitatoj kaj societoj; elprovu novajn organizajn formojn, pli proksimaj al la strukturo de la agrarindustriaj kompleksoj. En ĉiuj gvidorganoj estu elektataj pli multe da junaj kaj aktivaj membroj, altirante ankaŭ junulinon.

5. La estraroj de la sekcioj plifortigu sian laboron laŭ profesikrea linio (speciala terminologio, helpado de la profesia kvalifikado k. s.), pri ilia profesia stabiligo.

CK de BEA faciligu la eldonadon de fakterminaraj vortaroj.

6. La societaj estraroj enkonduku planan ordon en la financoj kaj statistiko.

7. Oni plibonigu la priservadon de la asociaj membroj per Esperanta literaturo, instruaj kaj aliaj helpiloj; la societaj estraroj organizu pli aktivajn ligojn kun la Bulgara Esperantista Kooperativo kaj plifortigu sian laboron konekse kun la varbado de individuaj kaj kolektivaj membroj de BEK.





8. CK de BEA organizu politikan edukadon kaj kultur-klerigan laboron inter la esperantistoj en spirito de la ideoj disvolvita en la Programo de BKP, kunhelpu la formadon de ilia marksisma-leninisma mondkoncepto, la plialtigon de ilia socialisma konscienco kaj disciplino; CK de BEA apliku la necesajn rimedojn por akurate havigi al la societaj estraroj materialojn por ideo-eduka laboro inter la esperantistoj, por plialtigo de illa ideologia prepariteco (50-a datreveno de la fondiĝo de l' Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj, 30-a datreveno de la Naŭseptembra Socialisma Revolucio k. a.).

9. La distriktaj komitatoj helpu la pli malmultnombrajn societojn enkonduki sistemecon en la organizado de sia kultur-kleriga kaj ideo-eduka laboro, liberigante sin de elementoj de neorganiziteco en tiu ĉi grava sfero de la esperantista agado.

Per la helpo de CK de BEA ili entreprenu iniciatojn por science esplori la intereson al kaj la lernadon de Esperanto, la propagandan efikon de sia laboro en la medioj de junularaj, laboristaj kaj aliaj tavoloj de nia socio.

10. La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ kreu stabilan kaj vivkapablan redaktan kolecion kaj plue variigu la redaktadon, plimultigu la materialojn por la novaj esperantistoj, klopodu pri decida plibonigo de ĝia poligrafia formiĝo kaj akurata eldonado, sen tedaj malfruigoj.

11. Oni serĉu novajn eblecojn por kontaktoj kun la Komitato de Televizio kaj Radio havante antaŭvide la fundamentajn taskojn de la esperantista movado, oni utiligu pli larĝe la centran kaj lokan gazetaron kaj radio-reton por popularigi la sukcesojn de la bulgaraj esperantistoj enlande kaj eksterlande.

1. La Kongreso devigas la bulgarajn esperantistojn plenumi sian altan patriotisman devon, patroprenante en internaciaj aranĝoj de la esperantista movado ĉe ni aŭ eksterlande, honore reprezenti nian socialisman patrolandon.

Oni enkonduku pli grandan organizitecon en nia partopreno en la internacia esperantista vivo, donante pli sisteman helpon al la delegitoj kaj aliaj partoprenontoj en kongresoj, konferencoj kaj aliaj similaj aranĝoj por organizita kaj disciplinita partopreno en ili per raportoj, diskutoj, proponoj k. a.; oni serĉu eblecojn plibonigi la Esperantajn disaŭdiĝojn de Radio Sofio por eksterlando.

2. Kune kun la Komitato de Turismo ĉe la Ministra Soveto, la Komitato de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlando, la Komitato de Arto kaj Kulturo k. s. CK de BEA gvidu sisteman laboron por popularigo de la bulgara literaturo, arto, kulturo kaj scienco inter la medioj de la internacia esperantista movado, por konatigo de la eksterlandaj esperantistoj kun la naturaj kaj ripozlokaj rimarkindaĵoj de Bulgario kiel lando de la internacia turismo.

3. La Estraro de la Asocio en kunlaboro kun la kulturaj centroj de la socialismaj landoj en la ĉefurbo kaj la koncernaj naciaj esperantistaj asocioj organizu komunajn kulturajn aranĝojn ĉe ni kaj eksterlande, kiuj kontribuu por la edukado en spirito de socialisma internaciismo, por plivastigo de niaj kontaktoj kun la esperantistaj asocioj en la frataj socialismaj landoj, por popularigo de l' atingiĝoj de nia patrolando sur la vojo de socialismo.

Oni plifirmigu la komunan laboron kun la esperantistaj asocioj kaj movadoj en la ceteraj socialismaj landoj kaj precipe kun la esperantistoj de Sovetunio, por organizado de duflankaj kaj multflankaj iniciatoj en komuna intereso, por interŝanĝo de spertoj kaj por plifirmigo de la profundaj internaciismaj tradicioj de la bulgara esperantista movado. Oni akcelu la subskribon de duflankaj kontraktoj por realigo de la supremenciitaj taskoj.

4. CK de BEA organizu por la bulgaraj esperantistoj kune kun „Balkanturist“, „Pirin“, „Koopturist“, „Orbito“ specialigitajn ekskursojn al eksterlando por kreado de personaj kontaktoj kun esperantistoj el aliaj landoj, kiel ankaŭ por partopreno en internaciaj esperantistaj aranĝoj.

5. La societaj estraroj kaj la distriktaj komitatoj donu pli proksiman helpon por la kanalligo, regula organizado kaj ide-politika alceligo de la internacia korespondado de siaj membroj, utiligante tiun ĉi kanalon por publika elmontriĝo de la esperantistoj en kunlaboro kun la lokaj neesperantistaj organizaĵoj kiel Patrolanda Fronto, Profesiaj Unuiĝoj, Konsomolo, diversaj Komitatoj (por defendo de la paco, de la abstinuloj k. s.) per organizado de laŭtemaj ekspozicioj de ricevitaĵoj materialoj, publikaĵoj en la loka gazetaro aŭ per la radio-reto, elmontriĝo kaj publikigo de interesaj leteroj el eksterlando ktp.

Oni ligu ĉi agadon ankaŭ kun la tradicia organizado de „Semajno de Internacia Amikeco“ aranĝata de UEA en februaro ĉiujare.

La rimarkindan 50-jaran datrevenon de la fondiĝo de USSR oni notu por sendado de gratuloj al solenaj societaj kunvenoj, ankaŭ per plivastigo de la individua kaj kolektiva korespondado kun ili.

6. Oni turnu specialan atenton al la bona preparado kaj organizado de diversaj iniciatoj subtene al la agado de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), kiu reprezentas la plej progresemajn tendencojn en la internacia esperantista movado.



Oni plibonigu la abonigadon de la bulgaraj esperantistoj al gazeto „Paco“ kaj ilian kunlaboron en ĝia redaktado.

7. La junaj esperantistoj sub la gvidado de CK de BEA kaj de ĝia Junulara Sekcio en kunlaboro kun la gvidantaj organoj de la Dimitrova Komunista Junulara Asocio (DKMS) pliaktivigu sian partoprenon en la laboro de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizaĵo (TEJO).

Ĉiuj aliaj sekcioj plibonigu siajn ligojn kun la parencaj organizaĵoj en aliaj landoj. La tuta internacia agado de la Bulgara Esperantista Asocio alceligu al plua plialtigo kaj plifirmigo de la prestiĝo de Popola Respubliko Bulgario kiel pacama socialisma ŝtato, al sistema konatigo de la eksterlanda esperantista mondo kun niaj sukcesoj en la konstruado de matura socialisma socio, al subteno de la progresemaĵoj tendencoj kaj movaĵoj en la internacia esperantista vivo; ĝi edukadu la bulgarajn esperantistojn en spirito de socialisma patriotismo, proleta internaciismo kaj internacia solidareco, por paco, amikeco, kunlaboro kaj frateco inter la popoloj sur la Balkanoj, en la Proksima Oriento, en Eŭropo kaj en la tuta mondo.

\* \* \*

La 38-a Kongreso de la bulgaraj esperantistoj, inspirita de la majestaj perspektivoj reliefigitaj en la Programo de la Bulgara Komunista Partio, esprimas sian firman certecon, ke ĉiuj organizaĵoj, organoj kaj agantoj de la Bulgara Esperantista Asocio ne ŝparos forton por efektiviĝi la kongresajn decidojn. Nur tiamaniere oni atingos pli altan nivelon de la ĉiutaga agado de l' esperantista movado kaj kreskigos ĝian aŭtoritaton enlande kaj eksterlande.

Plifirmigu la paco kaj la amikeco inter la popoloj sur la tuta tero!

Vivu kaj prosperu nia amata patrolando — Popola Respubliko Bulgario!

## DOKUMENTOJ

### МИНИСТЕРСТВО НА НАРОДНАТА ПРОСВЕТА

## ЗАПОВЕД

№ 2567

*Във връзка с предложението на Централния комитет на Българския есперантски съюз да се организира в нашата страна педагогическо-дидактически експеримент за изучаване на международния език есперанто*

### НАРЕЖДАМ:

1. Да се създаде към НИИО „Тодор Самодумов“ колектив от щатни и нещатни сътрудници в състав: Кунчо Вълев, хонорован преподавател по есперанто в Софийския университет — ръководител, и изпълнители: ст. н. с. Васил Бозаров, Иван Сарафов, Атанас Д. Атанасов, Таня Райкова и Марин Бъцев, който да организира педагогическо-дидактически експеримент за изучаване на международния език есперанто в продължение на три учебни години.

2. Да се определят за провеждане на експеримента за базови училища и учители:

а) Средното политехническо училище в гр. Попово — Вълка Тодорова Данкова, учителка по френски език;

б) Икономически техникум в гр. Велико Търново — Пенка Катева, учителка по немски език;

в) Средно политехническо училище в Перущица — Николай Недялков Бояджиев, учител по химия и френски език;

г) Основно училище в Темелково, Пернишки окръг — Цветана Зарева, учителка по български език и руски език;

д) Основно училище в с. Живково, Софийски окръг — Стоянка Аладжова, начална учителка.

3. За провеждане на експеримента да се определи по една експериментална паралелка в тези училища, учениците в която да изучават езика по 2 часа седмично.

За контролни могат да служат паралелки от същия клас в това училище, ако започват изучаването на някой чужд език.

4. На основание т. 68 от Инструкцията за приложение на щатна таблица № 2



на посочените учители да се заплаща 50% върху основната заплата допълнително възнаграждение.

Изпълнението на настоящата заповед възлагам на зам. министъра на Народната просвета и директор на НИИО „Т. Самодумов“ проф. Ж. Авджиев, и на съответните началници на отделите „Народна просвета“ при окръжните народни съвети.

11 юли 1972

МИНИСТЪР: (п) проф. СТ. ВАСИЛЕВ

## MINISTERIO DE POPOLA INSTRUADO

### ORDONO

№ 2567

Lige kun la propono de la Centra Komitato de la Bulgara Esperantista Asocio, ke en nia lando estu organizita pedagogia-didaktika eksperimento pri instruado de la Internacia Lingvo Esperanto mi

#### ORDONAS:

1. Ĉe la Scienc-Esplora Instituto de Instruado „Todor Samodumov“ estu formita kolektivo el etataj kaj neetataj kunlaborantoj en konsisto: Kunčo Vălev — honorariata instruanto de Esperanto en la Sofia Uniuersitato — gvidanto, kaj plenumantoj: supera scienca kunlaboranto Vasil Bozarov, Ivan Sarafov, Atanas D. Atanasov, Tanja Rajkova kaj Marin Băcev, kiu organizu pedagogian-didaktikan eksperimenton pri instruado de la Internacia Lingvo Esperanto dum tri lernojaroj.

2. Bazaj lernejoj kaj instruistoj por efektivigo de la eksperimento estu:

a) La Meza Politeknika Lernejo en Popovo — Vălka Todorova Dankova, instruistino de franca lingvo;

b) La Ekonomia Teknikumo en urbo Veliko Târnovo — Penka Kateva, instruistino de germana lingvo;

c) La Meza Politeknika Lernejo en Peruștica — Nikolaj Bojaĝiev, instruisto de kemio kaj franca lingvo;

ĉ) La Fundamenta Lernejo en Temelkovo, distrikto de Pernik — Cvetana Zareva, instruistino de bulgara kaj rusa lingvoj;

d) La Fundamenta Lernejo en v. Jivkovo, distrikto de Sofio — Stojanka Alaĝova, elementa instruistino.

3. Por fari la eksperimenton en tiuj lernejoj, oni fiksas po unu klaso, en kiu la lernantoj studu Esperanton po 2 horoj semajne.

Kiel kontrolaj povas servi klasoj el la sama lernejo, se ili komencas lernadon de iu fremda lingvo.

4. Surbaze de p. 68 de la Instrukcio pri Aplikado de Etata Tabelo № 2 al la fiksataj instruistoj oni pagu po 50% de ilia baza salajro kiel aldonan rekompencan.

La plenumon de tiu ĉi ordono mi komisiis al la vicministro de la Ministerio de Popola Instruado kaj direktoro de Scienc-Esplora Instituto de Instruado „Т. Самодумов“ Ж. Авджиев kaj al la koncernaj estroj de fakoj „Popola Instruado“ ĉe la distrikta popolaj sovetoj.

La 11-an de julio 1972

MINISTRO: (s) prof. ST. VASILEV

# ORGANIZA VIVO

## CELEBRADO DE NIKOLA ŜOPOV

Okaze de la 60-jariĝo de la elstara revoluciulo Nikola Ŝopov, iama sekretario de la Laborista Esperanto-Uniĝo, pendumita kiel komunisto en 1941, estis organizita la 28-an de aŭgusto solena kunveno de batalantoj kontraŭ la faŝismo en la ĉefurba Dimitrov-distrikto. Ĉeestis ankaŭ pluraj esperantistoj.

Raporton pri la vivo kaj agado de N. Ŝopov faris kaj rememorojn rakontis Asen Grigorov. Estis prezentita literatura programo.



La 26-an de junio 1972 reprezentantoj de Ŝtata Ekonomia Unuiĝo „Balkanturist“ kaj de la Komisiono de Turismo ĉe la Bulgara Esperantista Asocio traktis kelkajn problemojn pri plua aplikado de Esperanto en la turismo. Ili konstatis, ke Popola Respubliko Bulgario ĉiam pli sukcese disvolviĝas kiel lando de internacia turismo. Ĉiujare oni konstruas novajn turismajn objektojn apud la nigramara bordo, en montaraj ripozejoj, en centroj de mineralakva kuracado kaj multloke en aliaj partoj de la lando.

Oni konstatis ankaŭ, ke kelkaj firmoj kaj organizaĵoj jam uzas la Internacian Lingvon en sia turisma agado. Estonte „Balkanturist“ ankaŭ faros tion.

Ĉiujare dum la lasta duono de junio ĝi organizos por la eksterlandaj esperantistoj la aranĝon „Ripozo kaj Sano“ kun plej favoraj prezoj kaj kondiĉoj. En la filio-organizado oni enoficigos konvenan esperantiston, kiu okupiĝos pri la bona preparo kaj realigo de tiu aranĝo.

En 1973 j. „Balkanturist“ organizos specialajn turistajn E-grupojn el bulgaraj esperantistoj al Beogrado lige kun la Universala Kongreso de Esperanto, al Ateno — lige kun la Balkana Folkloro Festivalo, k. a.

„Balkanturist“ estonte utiligos la eblecojn de iuj E-eldonaĵoj kiel revuo „Bulgara Esperantisto“, „Turista Mondo“, la jarlibroj de UEA k. a. por turista informado.

La Komisiono de Turismo devigas sin labori inter la esperantistoj en la lando kaj ekster-

lando por popularigo de Popola Respubliko Bulgario kiel turisma lando kaj ŜEU „Balkanturist“ kiel organizaĵo, laboranta en la enlanda kaj internacia turismo. Ĝi helpas pri siatempa trovo de tradukistoj, pri la kvalito de la tradukaĵoj, pri utiligo de la leteroj, kiujn „Balkanturist“ ricevas en Esperanto. La Komisiono ankaŭ klopodos maksimume por ĝustatempa kompletigo kaj organizado de turistaj E-grupoj al eksterlando. Pere de la bulgaraj kaj alilandaj revuoj kaj gazetoj ĝi larĝe diskonigos la E-aranĝon „Ripozo kaj Sano“ por altiri pli da partoprenantoj en ĝi. La Komisiono laboros por starigi aktivajn kaj utilajn ligojn inter „Balkanturist“ en urbo Velingrad kaj la esperantistoj-turistoj el la loka E-societo „Stoju Kalpazanov“ rilate al renkonto, loĝigo kaj agrabla ripozo por la gastoj turistoj.

La nova interkonsento malfermas larĝan kampon por apliko de Esperanto en la Internacia Turismo.

*D. Mutuŝev*

### EKSKURSO AL TROJAN-BALKANO

La 8—9-an de julio ĉ. j. E-societo „Hristo Botev“ ĉe la Ministerio de la Transporto aranĝis aŭtobusan ekskurson por siaj membroj ĝis la Monaĥejo de Trojan kaj monto-domo „Beklemeto“ en la Balkano.

La ekskursantoj vizitis la historian muzeon de la monaĥejo kaj la ejon, kie kaŝis sin la Apostolo de la Libero Vasil Levski.

*V. Kirilova*

### AL LA SOMERAJ PORINSTRUISTAJ E-KURSOJ EN BURGAS

Ci-somere mi estis feliĉa partopreni en la Hungara Kulturfestivalo en Budapeŝto kaj en la Internacia Turista Renkontiĝo-Festivalo en Szeged. Apenaŭ finiĝis tiuj du ege interesaj Esperanto-aranĝoj kaj . . . mi ekveturis al alia. En la hungara urbo Bekeŝĉaba mi kaptis la rektan vagonaron „Transdanubius“. Mia nova celo estis la Someraj Porinstruistaj E-Kursoj en nia apudmara urbo Burgas . . . Tiam mi ankoraŭ ne sciis, ke la saman vagonaron jam uzis kaj uzos aliaj partoprenantoj en la samaj kursoj. Mi sciis nur, ke per „Transdanubius“ antaŭ kelkaj tagoj forveturis al Burgas la hungara E-pedagogo Geza Kurucz (Kuruĉ) — instruisto de rusa kaj hungara lingvoj en Keĉkemet, kune kun sia edzino kaj kvinjara filo Zoltan, ankaŭ parolanta Esperanton. La celo de s-ano Kurucz estis kiel la mia!

Kiam la sekvan posttagmezon la vagonaro haltis en Burgas kaj mi kun kofro enmane eniris la poŝtejon por sciigi telefone miajn familianojn en Sofio, ke mi jam estas sur bulgara tero, miajn orelojn karesis la konata melodio de nia Internacia Lingvo. Jes, juna paro parolis Esperante . . . Ni konatiĝis: Ali Sabriev el Ŝumen kaj lia hungara amikino Kati. Ili klarigis al mi kiamaniere atingi la E-kursojn, kiujn ankaŭ ili partoprenas.

En kvartalo „Meden Rudnik“, je kelkaj dekoj da metroj for de la lasta haltejo de aŭtobuso n-ro 9, dekstre de la ĉefa strato mi vidis novan, belan, kvinetaĝan domon kun esperantlingvaj sloganoj sur la balkonaj balustradoj kaj apud ĝi — alian duetaĝan — versaĵne la lernejo mem. Sur ties tegmento fiere staris granda kvinpinta ruĝa stelo kaj serpo kun martelo.

Oni akceptis min kiel malnovan amikon. La administranto de la kursoj k-do Ivan Canev donis al mi la unuajn informojn pri ili kaj pri ties gvidantoj. Estis du A-grupoj, gvidataj de Georgi Dimov el Varna kaj Violin Oljanov el Sofio; du B-grupoj, gvidataj de Nikolaj Bojaĝiev el Plovdiv kaj Jordan Angelov el v. Ĉeŝnigirovo, distrikto de Plovdiv; du C-grupoj, gvidataj de Kunĉo Vălev el Sofio kaj Canko Murgin el Ŝumen. Mi mem, instruisto de germana lingvo





en sofia lernejo ekde nun jam estis ordinara kursano en C-grupo kaj devis kiel obeema lernanto premi dum kvin studhoroj la lernejan benkon en daŭro de pli ol du semajnoj.

La instruado estis vere altnivela. En la plej superaj C-grupoj instruis gramatikon K. Vălev, historion de la bulgara kaj monda E-movado — Canko Murgin kaj metodikon — la jam konata hungara pedagogo Geza Kurucz, ĉefredaktoro de la nova internacia lerneja E-revuo „Juna amiko“, kies unua numero aperos ĝis la fino de tiu ĉi jaro. En la B-grupoj kaj A-grupoj krom ties gvidantoj kiel instruantoj aperis ankaŭ C-kursanoj, kiuj faris provleciojn. Ja tio estas necesa por ĉiuj, kiuj deziras fari ekzamenon por instruarjto de Esperanto.

Al fervora studado instigis nin ne nur la gvidantoj, sed ankaŭ la sloganoj kaj bonaj pensoj sur la ĉambraj muroj, kiel: „Legu por scii!“, „Pensu por kompreni!“ k. a. Du tagojn post mia alveturo venis grupo de junulinoj el Hungario — studentinoj kaj lernantinoj el la lastaj klasoj de diversaj lernejoj. Niaj kursoj fariĝis internaciaj, ĉar krom la junaj hungarinoj kiel kursanoj en la benkoj sidis ankaŭ samideaninoj el Pollando kaj Slovakio. Entute la eksterlandaj gekursanoj estis pli ol dudek kaj la bulgaraj gekursanoj, kune kun la plej junaj — la 10-jara Kremona Marinova kaj Branimir Vălev, ambaŭ el Sofio — estis ĝuste cent personoj. La estraro de la kursoj devis formi apartan studgrupon por la ĵus alvenintaj hungarinoj.

Aparte ŝatataj estis la studhoroj de Jordan Markov el Sofio, kiu kantigis ĉiujn per sia dolĉa fluto. Dank' al li ni ellernis multajn novajn E-kantojn, kiujn ni uzis poste en la programoj de la amuzvesperoj. La unua amuzvespero estis interkona. La programon partoprenis ankaŭ alilandaj kursanoj. La duan amuzvesperon partoprenis ankaŭ sovetaj maristoj kune kun sia ŝipestro sub la sonoj de akordiono, per kiu ludis soveta maristo. Ĉiuj gaje dancis kaj kantis sovetajn kantojn. Salutparoladon honore al la sovetaj gastoj faris k-do Kunĉo Vălev, kiu esprimis nian kaj de la tuta bulgara popolo estimon kaj amon al la sovetaj popoloj, niaj dufojaj liberigintoj.

Aktive partoprenis la amuzvesperon ankaŭ nia ĉefkuiristo kaj fervora esperantisto baj Ivan Iliev, kiu ludis ĵerte popolajn melodiojn per sia ŝalmo kaj gajnis tiel la aplaŭdojn de la aŭskultantoj. Tiun ĉi amuzvesperon ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de la loka E-societo „Nigra Maro“. Ĉi restos en la koroj de ĉiuj ĉeestantoj por ĉiam kiel vere internacia vespero.

Ĉiutage post la riĉa kaj bongusta manĝado preskaŭ ĉiuj rapidis al la plaĝo, por ripozi sur la sablo, sin bani en la varma marakvo kaj sin brunigi sub la varmegaj sunradioj. Jes, estis sufiĉe da tempo ankaŭ por distro aŭ por promenado en la apudmara ĝardeno sub la ombroj de ties multfoliaj arboj... Kaj pro la tro „lacigitaj“ de studado restis la komfortaj ĉambroj de la pensiono. Ili kontentigis ĉiujn, kiuj restis tie legante interesan libron aŭ ripozante en la lito. Se en la ĉambroj estis tro varme, malvarma duŝo tuj reguligis la korptemperaturon...

Mi ne povus ne menci pri nia promenado tra la malnovaj kurbaj stratoj de la antikva, apudmara urbo Sozopol, kiam la fotoaparatoj „varmigis“ pro senĉesa uzado, fiksan surfilme ĝiajn pitoreskajn angulojn, domojn, la marbordon. Aŭ pri nia vizito en ĝia malgranda historia muzeo, troviĝanta sub la kupolo de antikva preĝejo, en kiu ni vidis tre interesajn elfosaĵojn, ligitajn kun la malnova historio de la urbo.

Mi ne povus ne menci pri la ekskurso al la ĉarma rivero Ropotamo, kiun ni faris iun dimanĉon per aŭtobuso. Tie ni veturis per boato sur la trankvilaj riverakvoj kaj vidis la belajn akvoliliojn. Posttagmeze, dum la ripozo, sur la strando de apuda kampadejo la forta ventego levis dumetrajn ondojn, kiuj kun muĝo disfalis sur la sablo.

Apartan perŝipan ekskurson ni faris ĝis la bone konata al ĉiu bulgaro malgranda insulo Bolŝevik, kiun la faŝistoj transformis en malliberejon por komunistoj. En la muzeo de la insulo ni povis vidi kaj legi la historion de tiuj kuraĝaj filoj de nia popolo, parto de kiuj, mortkondamnitaj, sukcesis kapti la gardistaron, per boatoj atingi la bordon kaj poste piede tra la monto Sîrânĝa kaj Turkujo, savi sin en la fratan Sovetunion.

Sed la tempo kuris nerimarkite, kaj venis jam la fino, kiam ni devis montri al la kurs-estraro, ke ni estis bonaj kursanoj... La lastaj du tagoj estis plenaj je streĉo! Ni estis maltrankvilaj kiel lernantoj antaŭ la ekzamenoj. Ilin sukcese faris en A-grupoj — 30 gekolegoj, en B-grupoj — 38; en C-grupoj diplomiĝis 17 gekolegoj, kiuj ricevis la rajton instrui Esperanton en lernejoj kaj civitanaj kursoj.

Dimanĉe posttagmeze komencis forveturi hejmen la unuaj gekursanoj — kun kofroj kaj valizoj enmane, kun akiritaj novaj konoj enkaŭ, kun adresoj de novaj enlandaj kaj eksterlandaj amikoj enpoŝe. Ĉiuj estis kaj restis treege kontentaj, ĉar dum 20 tagoj ili ne nur ripozis, sed ankaŭ sukcese uzis la tempon por perfektigi sin en la lingvo. En siaj urboj kaj vilaĝoj ili eklaboros ankoraŭ pli fervore por disvastigo de nia kara Esperanto kaj pere de ĝi — por amikeco inter la popoloj, por daŭra paco en la mondo.

Marin Băceș

## ЗАДОЧНИ КУРСОВЕ ПО ЕСПЕРАНТО ЗА УЧИТЕЛИ

През учебната 1972/1973 г. се организират отново задочни курсове по есперанто за учители.

В курсовете са застъпени следните степени на обучение:

I — за начинаещи

II — за напреднали.

Курсистите се снабдяват с учебници за самостоятелни занимания. Месечно те представят по две контролни писмени упражнения. В края на всеки месец се водят присъствени занятия за затвърдяване на изученото, за езикови упражнения и за въвеждане в предстоящия за изучаване материал. Присъствените занятия се провеждат по райони: София, Пловдив, Сливен, Варна, Шумен, Търговище, Попово, Велико Търново, Враца, Ловеч и др.

Предвижда се няколкодневен семинар за всички курсисти през пролетната ваканция. За конкретните условия на семинара ще се съобщи допълнително.

През тази учебна година ще се организират и присъствени курсове за учители в София и други градове, където има желаещи (минимум 15 души).

В курсовете се приемат и младежи, завършили висше или средно образование. След завършване на курсовете се провеждат изпити и успешно издържалите ги получават свидетелство за съответната степен.

Таксата за задочните курсове е 15 лева, а за присъствените — 10 лв. В таксата се включва и стойността на учебниците.

Сумата за таксата да се превежда на името на ОКРЪЖНИЯ КОМИТЕТ НА БЪЛГАРСКИЯ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ, бул. Христо Ботев 97—София, по сметката му 185/2553 при ДСК—Благоевски район—София. Едновременно с изпращането на сумата да се съобщава с писмо желаната степен и точният адрес, на който курсистът ще кореспондира във връзка с курсовете.

Завършилите задочните курсове, както и присъствените такива, ще се приемат с предимство в 20-дневните присъствени международни учителски курсове по есперанто през лятната ваканция.

БЪЛГАРСКИ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ — УЧИТЕЛСКА СЕКЦИЯ  
СОФИЙСКИ ОКРЪЖЕН КОМИТЕТ НА БЕС

### Atenton !

Notu kelkajn ŝanĝojn de la abonkotizoj de „Bulgara Esperantisto“ por 1973 j Por eksterlando — 3,44 levoj, 5 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Pollando, Rumanio, GDR, Sovetunio — 2 levoj, 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro.





## Hungara Kultura Festivalo



Kiel sciante, la plej grava ĉi-jara Esperanto-aranĝo estas la Universala Kongreso de Esperanto. Ĉi-jare la laŭvica 58 UK okazis en Usono (Portland) — sufiĉe malproksime por multaj eŭropaj esperantistoj, ĉefe pro valutaj kaŭzoj.

Tial UEA iniciatis eŭropan Esperanto-renkontigon kaj turnis sin al Hungara Esperanto-Asocio. HEA ne nur akceptis organizi tiun aranĝon sub la aŭspicio de UEA, sed donis al ĝi tre interesan kaj originalan formon: kultura festivalo, kiu montros al la gastoj el eksterlando sufiĉe riĉan ideon pri la hungara kulturo en la plej

arĝa senco de tiu vorto. Krome, eŝtis rezervita ebleco al iuj internaciaj Esperanto-organizaĵoj realigi siajn fak-aranĝojn.

La hungaraj esperantistoj frunte kun B. Berceli, d-ro Mateffi k. a. faris multon por bonege organizi ĉion rilate la normalan iron de la necesaj detaloj: akceptado, loĝigo, senpaga veturado per ĉiuj urbaj transportiloj, diversaj giĉetoj, ekspozicioj, riĉega distra kaj kultura programo, ekskursoj sur Danubo en amika etoso, ekskursoj al historiaj kaj pitoreskaj lokoj en la lando...

La inaŭguro okazis en la plej granda salono de la Urba Kulturdomo en ĉeesto de pli ol 600 festivalanoj (el kiuj du trionoj el eksterlando) kaj reprezentantoj de gravaj sociaj instancoj: Ministerio de la Publika Instruado, la Ĉefurba Soveto, la Centra Konsilantaro de Sindikatoj, la Komitato por Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando. En la salutparoladoj ili esprimis la pozitivan rilaton de tiuj institucioj al la pacama kaj kultura agado de la esperantistaro.

Faris malgrandajn salutparoladojn ankaŭ reprezentantoj de landaj Esperanto-asocioj. Je la nomo de BEA kaj samtempe de MEM parolis ties prezidanto Nikola Aleksiev.

La partoprenantoj havis la maloftan ŝancon renkonti en la festivalejo famajn veteranojn de la hungara kaj internacia Esperanto-movado, brilajn Esperanto-literaturistojn, inter kiuj

*K-do B. Berceli malfemras la Festivalon*

Kaloczay — la vivanta patriarko de la Esperanto-literaturo.

Emociiga momento estis la inaŭguro de memortabulo sur la domo, en kiu loĝis longajn jardekojn la neforgesebla Julio Baghy.

D-ro I. Bacskai faris konvenan paroladon en Esperanto kaj en hungara lingvo, citante unu strofon de Baghy mem lige kun la forpaso de konata hungara esperantisto:

Muta lin Morto tombe katenas,  
Por ni memoro viva lin tenas.  
Noble li pensis, servis sen laco  
Por la kompreno, amo kaj paco.

Kiel trafe tiuj vortoj rilatas al Baghy mem!

En la kadro de la Festivalo okazis publika kunveno de MEM en unu el la plej oportunaj salonoj de la Kultura Domo. Ĝin plenigis la esperantistoj, kiuj volas aktive labori por la nobla afero de l' paco en la senco de la senmortaj vortoj de la fama filo de l' bulgara popolo Georgi Dimitrov: „Ne sufiĉas nur deziri la pacon. Necese estas batali por ĝi!”

Post enkonduka prelego de la MEM-prezidanto N. Aleksiev pri la internacia situacio kaj la ĉefaj taskoj de la esperantistaro por plifirmigo de la tutmonda paco, por baldaŭa kunvoko de Tuteŭropa Konferenco de la registaroj por sekureco kaj kunlaborado, faris koncizajn salutparoladojn la vicprezidanto de la Hungara Nacia Pacdefenda Komitato S. Harmath, P. Bal-





kanyi (Hungario), Schödl (GDR), Gl. Antonijević (Jugoslavio), Milada Jaskova (Ĉeĥoslovakio), J. Toczyski (Pollando). Je la nomo de ILEI salutis d-ro M. Dazzini, ĝenerala sekretario.

Estis aprobita speciala deklaro.

Antaŭ la festivalanoj estis bone prezentitaj la hungara muzika kaj teatra arto, diversaj riĉaj muzeoj, la vidindaĵoj de la „Perlo de Danubo“ — Budapeŝto, la neforgeseblaj vesperoj sur la kvieta Danubo, la mondfama „Balaton-Lago“, tipaj pejzaĝoj kaj historiaj lokoj de Hungario. . . Estas malfacile eĉ nur nombri ĉion.

La ĉefaj landaj gazetoj informis la larĝan socian opinion pri la laboro de la Festivalo. Speciale pri la publika kunveno de MEM skribis la plej amasaj ĉiutagaj gazetoj.

Ni sincere gratulas la gastigantojn kaj esprimas al ili nian kontenton pro la riĉa programo, kiu prezentis la fratan hungaran popolon kaj ties kulturon al centoj da eksterlandanoj.

*Ĉeestinto*

## INSIRUISTAJ ARANĜOJ EN LA KADRO DE LA HUNGARA KULTURA FESTIVALO

### *1. La VI Kunordiga Konferenco por Enkonduko de Esperanto en Lernejojn*

*18—19-an de julio 1972, Budapeŝto*

La ĉefa demando, kiun la VI Kunordiga Konferenco por Enkonduko de Esperanto en Lernejojn traktis, estis la stato de la pedagogia didaktika eksperimento (PDE). Kiel sciante, la III Kunordiga Konferenco en Maribor (1970 j.) decidis, ke oni komencu devigan instruadon de Esperanto en kelkaj lernejoj de la 5 kunlaborantaj landoj (Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio, Jugoslavio). Dum la pasinta 1971/72 lernojaro tiu instruado komenciĝis en 22 lernejoj kun 594 lernantoj: en Bulgario — 2 klasoj kun 50 lernantoj (en Veliko Tŕrnovo kaj Popovo), en Hungario — 9 klasoj kun 215 lernantoj, en Italio — 3 klasoj kun 85 lernantoj kaj en Jugoslavio — 8 klasoj kun 244 lernantoj (Serbio — 2 klasoj kun 67 lernantoj, Kroatio — 2 klasoj kun 59 lernantoj kaj Slovenio — 4 klasoj kun 118 lernantoj). La PDE en ĉiuj ĉi menciitaj lokoj ekmarŝis bone. Aŭstrio ankoraŭ ne aliĝis al PDE, ĉar la kleriga ministerio ne aprobis uzadon de la parte hungarlingva lernolibro de prof. d-ro J. Szerdahelyi. Nun, pro la apero de nova, tute internaciigita lernolibro de la sama aŭtoro, tiu baro jam malaperas.

Fortan impreson faris la informoj de d-ro Peter Zlatnar — prezidanto de la Instruista E-sekcio en Jugoslavio kaj direktoro de la Esperanto-Instituto de Slovenio. Li parolis pri „La influo de la eksperimenta instruado al la ĝenerala sinteno rilate Esperanton en Slovenio“. Dezirante subteni la eksperimenton, la Slovenia E-Ligo kaj la E-Instituto en Ljubljana organizis enketon por ekscii la interecon pri Esperanto kaj la E-movado. La rezulto estis miriga: preskaŭ centprocenta pozitiva sinteno de lernejoj, socipolitikaj organizoj kaj societoj al Esperanto! Al la enketo estis aldonita invito al unuopuloj kaj organizoj aliĝi al la E-movado kiel „amikoj de Esperanto“ kaj pagi difinitan sumon kiel kontribuon por realigo de la enket-

programo. Pozitive rilatas al Esperanto kaj subtenas ĝian fakultativan instruadon 383 elementaj kaj 161 aliaj mezaj kaj superaj lernejoj. Inter ili fariĝis „amikoj de Esperanto“ 378 elementaj kaj aliaj mezaj kaj altaj lernejoj. 44 komunumoj fariĝis kolektivaj anoj kiel „amikoj de Esperanto“. En la respubliko sentiĝas granda bezono pri E-instruantoj. Tial al la koresponda kurso por instruistoj aliĝis 453 pedagogoj, kiuj je lernejoj kostoj ellernos Esperanton kaj poste instruos ĝin en siaj lernejoj.

Kun granda intereso la konferencanoj aŭskultis la informojn pri la favora rilato kaj reala helpo de la Ministerio de Popola Instruado en Bulgario al

*Perŝipa promenado sur Danubo*



Esperanto, pri la lastatempaj sukcesoj de Esperanto en la bulgaraj lernejoj.

Alia granda demando, kiun la Konferenco traktis, estis la praktika aplikado de Esperanto inter la lernejoj, en kiuj la lingvo estas eksperimente instruata (korespondado, aranĝo de ekspozicioj el pentraĵoj, objektoj, fotoj k. a., ellaboritaj de lernantoj, ekskursoj, reciprokaj gastadoj, someraj tendaroj, diversaj sportaj kaj kulturaj konkuradoj ktp.). Kiel sciante, la III Kunordiga Konferenco en Maribor komisiis al la Bulgara Instruista Sekcio organizi kaj gvidi la praktikan aplikadon de Esperanto. La VI Konferenco konkrete traktis kaj aprobis la broŝuron „Formoj de eksterklasaj aktivecoj de gelernantoj kaj praktika aplikado de lingvaj kapabloj“, kiun preparis, taskigita de la V Kunordiga Konferenco, s-ano Helmut Sonnabend — vicprezidanto de ILEI kaj prezidanto de l' Asocio de Germanaj Esperantistoj Instruistoj. Tiu ĉi tre valora broŝuro devas esti en la manoj de ĉiu instruisto de PDE kaj membro de landa instruista sekcio, de ĉiu E-instruisto generale.

Do, tiel la PDE havas 3 centrojn:

1. *La organizan*: Konstanta Organiza Komitato (KOK), Tomanova 19, 62 000 Maribor, Jugoslavio;

2. *La praktikan*: gvidanto Marin Băcev, poŝtkesto 1014, Sofio 13, Bulgario;

3. *La fakan*: centra gvidanto prof. d-ro Istvan Szerdahelyi, Universitato ELTE — BTK, Pesti Barnabas 1—3, Budapeŝto V, Hungario.

La VI Kunordiga Konferenco estis mallongedaŭra, sed tre aktiva kaj rezultodona. Kompreneble, ĝi traktis ankaŭ aliajn demandojn, sed ĉi tie oni ne povus ĉion tuŝi. En ĝia laboro tre aktivan rolon ludis s-anoj Peter Zlatnar, Franjo Vetrih — prezidanto de KOK, H. Sonnabend, J. Szerdahelyi, Mario Dazzini — sekretario de ILEI, k. a.

## 2. La Konferenco de ILEI

20—23 de julio 1972, Budapeŝto

La inaŭguro de la Konferenco de ILEI okazis la 20-an de julio en ĉeesto de pli ol 100 geinstruistoj el multaj eŭropaj landoj. Estis prezentitaj salutoj en la nomo de la klerigaj instancoj de Hungario. En la nomo de la bulgara sekcio salutis la Konferencon Kunĉo Vălev. Li rakontis koncize pri la stato de Esperanto en la bulgaraj lernejoj, pri la lastaj favoraj paŝoj de la Ministerio de Popola Instruado al la Internacia Lingvo kaj speciale pri la forestaj porinstruistaj E-kursoj, organizataj jam kvaran jaron de nia Instruista Sekcio kaj al Sofia Distrikta Komitato de BEA.

Helpe al la Konferenco laboris tri komisionoj, kiuj pridiskutis detale kelkajn plej aktualajn problemojn de ILEI laŭ la diversaj aspektoj de ĝia agado. La 22-an de julio ĝenerala kunveno de la Konferenco akceptis konkretajn decidojn. Ĝi definitive aprobis: la regularon pri la internaciaj pedagogiaj Esperanto-ekzamenoj; planon por reorganizo de ILEI laŭ zonoj kaj regionoj (lige kun tio — regiono I de ILEI, konsistanta el Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio); tri seminariojn por preparo de E-instruistoj el inter profesiaj instruistoj: en Burgas (Bulgario), Primošten (Jugoslavio) kaj Graz (Aŭstrio); la fondon de scienca E-centro en Budapeŝto, kiu esploros problemojn lingvistikajn, metodikajn, historiajn, literaturajn k. a. sub la gvido de prof. d-ro Istvan Szerdahelyi. Estis decidite, ke la sekva konferenco de ILEI okazu de la 21 ĝis la 27 de julio 1973 en Maribor, senpere antaŭ la 58-a UK de Esperanto en Beograd.

Dum la tuta tempo aktive partoprenis kaj gvidan rolon en la laboro de la Konferenco havis la vicprezidanto de ILEI rektoro Helmut Sonnabend (GFR), ĝia sekretario Mario Dazzini (Italio), prof. d-ro J. Szerdahelyi — estro de la E-katedro en la Budapeŝta Universitato, k. a.

La Konferenco estis solene fermita la 23-an de julio kune kun la tuta Hungara Kultura Festivalo.

Kunĉo Vălev

## Malĝojiga letero el Hindujo

Estimataj gesinjoroj,

Ni havas la malgajan taskon informi vin pri la malfeliĉo okazinta al la sekretario de la Hinda Instituto de Esperanto, s-ro Seoti Prakash.

La 18-an de junio kun sia familio li estis en Hardward, ĉe la rivero Gango. Pro virino, falinta en la riveron, kiun li klopodis savi, li mem falis en la akvon. De tiam oni ankoraŭ ne retrovis lian korpon.

Tio estas granda malfeliĉo por lia edzino kaj tri georfoj, ankaŭ por HIE, kies sekretario li estis delonge, klopodante firmigi la pozicion de Esperanto en Hindujo.

Lia malapero estas granda perdo por la eta movado en nia lando, sed la estraro, kun nova sekretario, klopodos daŭrigi lian laboron.

Kun sincera salutoj,

S-ino Haudebine

C—55, N. D. S. E., Part II, New Delhi—49





Petite de la prezidanto de BEA Nikola Aleksiev, la elstara hungara E-poeto kaj verkisto Kolomano Kalocsay diris la jenajn vortojn al la bulgaraj esperantistoj :

*Aŭdinte pri Bulgario tuj venas en mian kapon tiuj tempoj, kiam mi kunlaboris kun la karmemora I. H. Krestanov pri la Bulgara Antologio. Kaj estis al mi granda ĝojo, kiam mi vidis, ke William Auld prenis kiel moton por sia poemplibro „La infana raso“ citaĵon el poemo de Ĉilingirov.*

*Poste venis la epoko de la „Internacia Kulturo“, en kies batalo por demokratio kaj kontraŭfaŝismo mi partoprenis, eĉ se modeste, per kelkaj miaj artikoloj kaj originalaj poemoj.*

*Estas nur bedaŭrinde, ke tiuj profete anoncitaj deziroj, kiujn mi esprimis kontraŭ la „caudillo“ Francisko Franco kaj kontraŭ la grekireĝa faŝismo, ne realiĝis.*

*Fine mi rememoras pri la ĝojo, kiun donis al mi ĉiu numero de la „Nuntempa Bulgario“ kun siaj belaj koloraj bildoj pri ora plaĝo, marmorbriilo de konstruaĵoj kaj pri la antikva heredaĵo el la tempo de Orfeo.*

*Jen kial mi ĝojis, ke la gvido de MEM nun rezidas en Bulgario. Ĝi estas tie sur ĝusta loko kaj en ĝustaj manoj.*

*Vivu la paco, vivu la socialismo, vivu Bulgario!*

K. KALOCSAY

## ESPERANTO KAJ LA BEZONO PRI FACILE ELLERNEBLA INTERNACIA LINGVO

de akad. Georgi Naĝakov



*Ĉe la nuntempaj internaciaj rilatoj, kiuj postulas ĉiam pli oftajn internaciajn renkontiĝojn en ĉiuj sferoj — scienco, kulturo, sporto, ekonomio, politiko, la bezono de internacia facile komprenebla kaj egale akceptita de ĉiuj popoloj lingvo estas pli ol evidenta.*

*Por la internaciaj aranĝoj en la Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj (UNO) mem kaj ankaŭ en ĉiuj organizoj en ties sistemo estis oficiale akceptitaj la kvin plej disvastigitaj lingvoj en la mondo — angla, rusa, franca, hispana kaj ĉina. Tie, kie ekzistas la necesaj kondiĉoj pri samtempa tradukado, oni parolas ĉiujn ĉi kvin lingvojn. Tamen efektive pro diversaj pluraj kaŭzoj oni uzas nur 3—4 lingvojn, kelkloke du — la anglan kaj la rusan, eĉ nur unu el tiuj du, depende de la loko, kie okazas la internacia renkontiĝo, kaj de ĝia karaktero. Kiel internacian lingvon en la orientaj landoj de la socialisma tendencaro oni akceptis la rusan, dum en la okcidentaj landoj oni akceptis la anglan.*

*En la internacia vivo antaŭ la Unua Mondmilito la franca lingvo ludis la rolon de internacia lingvo de la diplomatio. Dum la periodo inter la du mondmilitoj la germana ekspansio klopodis altrudi la germanan kiel internacian.*

*Se oni havas antaŭvide ankaŭ la fakton, ke ĉiu el la menciitaj kvin lingvoj estas sufiĉe fremda por la aliaj popoloj kaj tre malfacile ellernebla, oni povas kompreni, kial delonge aktualas la bezono pri internacia lingvo, konstruita surbaze de la principoj de la ĝenerala lingvoscienco. El multaj provoj tiurilate sendube plej taŭga kaj plejfacile ellernebla estas la proponita antaŭ pli ol 80 jaroj de d-ro Zamenhof internacia lingvo Esperanto. Tamen restas nesolvita la demando, kial ĝis nun tiu admirinda, ekstreme facila lingvo, kreita de unu genia ideo, ne ricevis la necesan larĝan disvastiĝon kaj aplikon, se ne en ĉiuj, almenaŭ en iuj internaciaj renkontiĝoj.*

*Al mi persone ŝajnas, ke tio estas ŝuldata al la nesufiĉa internacia propagando pri tiu lingvo kaj al la nebona metodo de ĝia instruado. Mi opinias, ke la demandon pri taŭga internacia lingvo oni devas meti je diskutado en la Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj mem.*





Se la plimulto el la ŝtatestroj de la evoluantaj landoj akceptos la enkondukon de Esperanto kiel deviga lernobjekto en la filologiaj fakultatoj de siaj pedagogiaj altlernejoj, kaj se post kelkaj jaroj, havante jam alte kvalifikitajn instruistojn, oni enkondukos la saman objekton en la lernejojn, rezulte de tio en mallonga tempo estiĝos ebla la apliko de tiu internacia lingvo en pluraj internaciaj renkontiĝoj. La instruado de Esperanto en la filologiaj fakultatoj ebligas same ĝian sciencon evoluigon kaj perfektigon. Ĉe la ekstrema dinamismo de la socia evoluo nun, en la epoko de scienca-teknika revolucio, simila evoluo okazas en ĉiu nacia lingvo.

Rilate tiun ĉi problemon simila paŝo al UNO pere de la nuna Ĝenerala Sekretario S-ro Kurt Waldheim ŝajnas al mi tre konvena, des pli se oni petus ankaŭ la subtenon de la Prezidento de la Aŭstra Respubliko S-ro Franz Jonas — li mem estas entuziasma esperantisto kaj, kredeble, havas sufiĉe grandan aŭtoritaton antaŭ S-ro Waldheim — lia samlandano kaj politika kunaganto.

## 58-a Universala Kongreso de Esperanto

28. VII — 4. VIII. 1973, Beograd, Jugoslavio

Alta protektanto: la Prezidanto de SFR Jugoslavio Josip Broz Tito



### BEOGRAD ĈE LA DU RIVEROJ

Beograd — la blanka urbo, kiel ĝia nomo asertas, preskaŭ tute ne portas la signojn de sia longega historio. Ĝi estas moderna grand-urbo kun proksimume 1 200 000 loĝantoj... Ĉu pardonpeti, ke la ĉefurbo de Jugoslavio havas iom tro tempestan historion, kiu inkluzivis senĉesan batalon por ekzisto, centojn da atakoj, kvardekon da regantoj, el kiuj ĉiu kutime detruis la trovitaĵon por konstrui tion, kio estos ekstermodelo de la sekvonta reganto. Sed tamen en trideko da beogradaj muzeoj vi trovos spurojn, kiuj pruvas, ke la vivo ĉi tie ekzistis jam antaŭ sep mil jaroj almenaŭ. Vi tie malkovros ankaŭ, ke la urbo de la rendezuejo de la granda Danubo kaj la plej granda jugoslavia rivero Sava naskiĝis antaŭ 24 jarcentoj sub la romia nomo Singidunum.

Sed — for la historio kaj ĝiaj suferoj! Ankaŭ Beograd turnas sin pli volonte al la estonteco. Tion vi vidos en ĝiaj stratoj, precipe en la avenuoj kaj bulvaroj de ĝia nova parto trans la rivero Sava, kie altaj kaj sveltaj loĝdomoj kaj oficejaj konstruaĵoj atentigas pri la ĉeesto de modernaj urboplanado kaj arkitekturo.

Oni asertas, ke en la someraj monatoj Beo-

grad estas varma, sed oni ne preteratentu la faman beogradan venton „košava“, kiu blove etas aŭ egas dum almenaŭ tricent tagoj en la jaro. Cetere, ĉu oni entute serioze traktu la onidiron pri la varmo, se ĉeestas du grand-riveroj kaj tutaj urbaj kvartaloj (Košutniak, Topčidere), kiuj efektive estas parkoj? Proksimas ankaŭ la monto Avala (20 km) kun la impona Monumento de la Neknata Herco kaj televida turo, kiu altas pli ol ducent metrojn.

Beogradaj vesperoj — ni ne diras tiel, sed — vesperoj en „Skadarlija“. Temas pri tuta kvartalo en la koro de la urbo, kiu rekonstrue reprenis la vestaĵon de la pasinta jarcento aŭ almenaŭ tiun de la komencaj jaroj de la jarcento, en kiu ni vivas. . . En la tieaj teatro kaj kinejo oni prezentas programojn, kiuj amuzas per sia tempoparfolio; ĉe la „Du Cervoj“, „Tri Ĉapeloj“, „Ora Pokalo“ aŭ „Skadarlija“ mem — nomoj de malnovaj restoracioj — oni ankoraŭ povas aŭdi la plej aŭtentikan kaj malnovan urban muzikon kaj gustumi la plej famajn produktojn de la serbaj gastronommagazenoj kaj vinkeloj.

Tamen malĝuste estas supozi, ke Beograd estas serba urbo, ĉar ĝi plene internaciĝis. . . Senkonsidere de kie venas la civitanoj de Beograd, ĉu ili naskiĝis tie aŭ venas el Montenegro, Kroatio, Bosnio, Slovenio, Kosovo, Hercegovino, Makedonio, Vojvodino aŭ Serbio mem, — ili ĉiuj sentas sin parto de Beograd, donante al kaj trovante en ĝi ankaŭ la parfumon de sia naskiĝregiono. Pro la bunteco de sia loĝantaro, kio tute certe estas ĝia ĉefa karakterizo — Beograd estas antaŭ ĉio — jugoslavia urbo.

. . . Se vi en niaj lando kaj urbo pasigos almenaŭ parton de viaj ferioj, ni estas certaj, ke vi ekopnios, ke la vorto „gastamo“ devus origini el tiu ĉi parto de la terglobo.

El „Oficiala Bulteno“ (kun mallongigoj)

## Internacia sukceso de niaj artistoj-esperantistoj

De la 6-a ĝis la 12-a de majo ĉ. j. en urbo Lugano, Svislando, okazis la 24-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperantista Federacio (IFEFF). La Loka Kongresa Komitato invitis la famajn geaktorojn de la Bulgara Esperanto-Teatro Belka Beleva, Anani Anev kaj Mihail Ĉobanov por partopreni la belartan programon de la Kongreso.

Je la 10-a de majo en la salono „Paviliono Conza“ en la ĉeesto de proksimume 700 kongresanoj niaj artistoj prezentis spektaklon enhavantan 3 unuaktajn teatraĵojn: „Urso“ de A. Ĉeĥov, „Kara mensoganto“ de G. Kilti kaj „Divorco“ de N. Slonova.

Antaŭ la komenciĝo de la spektaklo reprezentantoj de la svisa gasetaro, radio kaj televido prenis intervjuon de la aktoroj. Grupo de la televido filmis parton de la spektaklo kaj la sekvan tagon faris raporton pri tiu evento en daŭro de 6 minutoj.

En la oficiala raporto pri la 24-a Kongreso de IFEFF Claude Gacone — sekretario de la Kultura Centro Esperantista, donas jenan altan priakson al la partopreno de la bulgaraj aktoroj:

„Alia belega vespero estis la Teatra Vespere de la merkredo. Tiam ni povis ĝui la talenton de la bulgaraj geaktoroj Belka Beleva, Anani Anev kaj Mihail Ĉobanov. Sendube tiu vespero estis la kultura supro de la Kongreso. Kvankam la salonego akustike ne bone konvenis por rekta parolado al la publiko sen uzo de laŭtparolilo, la komprenebleco de la bulgaraj aktoroj estis tute kontentiga. La elekto de la tri unuaktaj verkoj, stile kaj epoke tre mal-similaj, estis bona ideo kaj pruvis la lud-variecon de la geaktoroj...“

... La decido venigi talentajn geaktorojn eĉ el tiel fora lando, kiel Bulgario, por la Teatra Vespere estas precedenco imitinda“.



## 10-JARA JUBILEO DE UTILA LABORO

La Infanan Sanatorion en Gdansk — Oliva venas malsanaj infanoj en aĝo de kelkaj ĝis dekelkaj jaroj. Temas precipe pri pulmmalsano, astmo, diversaj gorg- kaj traĥe-malsanoj ktp. Infanoj venas tien iam por tuta jaro, sed plej ofte nur por kelkaj monatoj. Por trui, kiuj restas tie — ĉu pli, ĉu malpli longe, — oni fondis en la Sanatorio lernejon, kies programo koincidas kun la programo de la aliaj lernejoj en Pollando.

La infanoj, kiel infanoj, post sia alveno plendas, ploras, estas malgajaj, sopiras heimon, gepatrojn kaj ĉion, kion ili lasis ie ekster la kuracejo.

En 1961 jaro unu el la instruistinoj, koleginino Janina Pieróg, ekhavis la ideon instrui al pli aĝaj infanoj Esperanton kaj fondi korespondan grupon — rondeton, por fortiri iliajn pensojn el la abismoj de ĉagreno kaj malĝojo kaj okupi ilin pri io nova, gaja, interesa, „eksterordinara“. La lernejestrino, s-ino Gdanice, apogis la projekton, la kuracistoj substrekis, ke tio certe influos bone la sanigprocedon ĉe la junaj pacientoj.

En oktobro de la kuranta jaro la Rondeto festis sian jam dekjaran ekzistadon.

Dum tiuj dek jaroj ĝi, intime kunlaboranta kun la institucio „Geonkloj Esperantistaj“, trovis multajn amikojn en la tuta mondo. La infanoj kun granda emocio atendis ĉiun korespondadon, lernis Esperanton, laboris en la Rondeto, preparis donacetojn por la plum-amikoj kaj ĉe tiuj laboroj forgesadis pri sia sorto, pri la fakto, ke ili estas for de siaj hejmoj, gepatroj, geamikoj. Novaj perspektivoj aperis antaŭ iliaj okuloj. De tempo al tempo, pro iu okazo, ili preparis kun sia instruistino ekspoziciojn de ricevitaĵ albumoj, korespondadoj, bildkartoj k. s. Ordinare tiuj ekspozicioj vekis admiron kaj interesiĝon kiel pri la laboroj de la Rondeto, tiel ankaŭ pri Esperanto. Ili kaŭzis diversajn interparolojn, demandojn, rimarkojn kaj la esperantistoj liveris al la vizitantoj multajn informojn pri la lingvo kaj pri la labor-metoj kun infanoj pere de tiu lingvo.

Granda ekspozicio okazis en oktobro ĉ. j. lige kun la dekjara jubileo de la Rondeto. Certe estas granda la merito de la instruistino, kiut per sia persisteco, konsekvenco kaj bona organizado dum tiuj dek jaroj ne nur kun nevelkanta entuziasmo disvolvis la laboron, sed ankaŭ ĉiam penadis fari ĝin pli interesa, pli valora. Tamen ankaŭ vere netaksebla estas la merito de tiuj multaj senlacaĵ, bonkoraj, komprenemaj kaj vere amikaj „Geonkloj“, kiuj dum tiu longa tempo ne laciĝis, ne rezignis, ne lasis la korespondadon kun la



infanoj. Kelkaj estis fidelaj eĉ ĝis la morto, kiel ekzemple onklo Cook el Skotlando — neforgesebla, aminda onĉjo, korespondanta ĝis la lasta momento de sia vivo. Oni ne povas ne menci pri la onklino Luĉi Terrazzani el Verona — Italio, kiu dum la pasinta jaro eĉ trovis tempon por veni en Gdansk ĝuste la Internacian Tagon de l'Infano (la 1-an de junio). Ŝi kaŭzis en la lernejo grandan solenaĵon.

Kaj la aliaj geonkloj? Jen onklo Lakemond el Nederlando, kiu ĉiukaze sendas belegajn bildkartojn al la infanoj; jen onklo Giovanni Barbieri el Italujo — ĉiam memoranta, bonhumora, zorgoplena; jen onkloj Gibež, Odette Meunier, Boyet, Vincent kaj onklo Chaigneau el Francio, onkloj Newton kaj Tharme el Anglujo, onklino Stakacsu el Hungarujo, onklo Johano Smits el Litovujo, R. Schönfeld el GDR, onklino Rita Aagaard el Nov-Zelando kaj multaj, multaj aliaj, kies nomoj gravuriĝis per oraj literoj en la koretoj de la dankemaj infanoj kaj kiujn ne estas eble ĉi-tie menci. Ne forgesas pri la Rondeto ankaŭ la „general“ de la Geonkla Movado, la ŝatinda s-ro Sullivan mem.

La membroj de la Rondeto malofte ellernas Esperanton ĝisfunde. Mankas tempo — ofte tro mallonge ili restas en la sanatorio. Tamen dum sia restado tie ili spiras vere Esperantan aeron.

### ESPERANTO-KURSOJ EN ODESA

Ĉe la Odesa Domo de Sciencistoj jam kejkajn jarojn funkcias kursoj de Esperanto. Partoprenas homoj de diversaj aĝoj. Ĉefa kursgvidanto estas la malnova esperantisto Naum Sigal. Lin helpas k-doĵ Peŝtimolĝan, Geht kaj Vagramov.

La gekursanoj vizitis la kunvenojn de l' ukraina junularo en Ĥarkov, Doneck, Poltavo. Pasintjare k-dino Odincova partoprenis Esperanto-feriadon en Miedzyzdroje (Pollando).

Dum la lernado la kursanojn vizitis kelkfoje la Esperanto-veterano Sergej Rubljov, konata aŭtoro de bona lernolibro kaj tradukinto de rusaj kaj sovetaĵ poetoj en Esperanton, redaktoro de la soveta eldono de „Paco“ kaj de la soveta revuo „Por la paco“. Vizitis ilin ankaŭ V. Samodaj el Moskvo kaj aliaj gastoj el USSR, Bulgario k. a.

Vivu la soveta-bulgara amikeco!

Vivu la fraturboj Odessa kaj Varna!

*N. Sigal*



Forirante de la lernejo ili ne forgesas tion. Ili serĉas kontaktojn kun Esperanto-organizaĵoj, daŭrigas la korespondadon, skribas al sia instruistino de Esperanto kun peto pri helpo, pri informoj, pri korekto de skribitaj leteroj.

Ne ĉiuj semoj perdiĝas. . .

Ni gratulas al s-anino Pieróg, al la Rondeto, al la estimataj geonkloj! Jen bona kaj ufla laboro!

La adreso de la Rondeto estas:

**Porinfana Sanatorio, Esperanto-Rondeto,  
Gdansk — Oliva, Polanki 119—120, Pollando.**



**Ĉefredaktoro:** Kunĉo VÁLEV

**Redakta komitato:** Bojka BATALSKA, Asen GRIGOROV, Tatjana EVSTRATIEVA  
Venelin MITEV, Stefka ĤRISTOVA, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-8



**ГРАЖДАНИ И ГРАЖДАНКИ,  
МЛАДЕЖИ И ДЕВОЙКИ,**

**СП „ВСЕСТРАННИ УСЛУГИ“** — курсове за самообразование и квалификация, съобразявайки се с големия интерес и търсене, организира и провежда повече от 15 години

**ЗАДОЧНИ КУРСОВЕ ПО :**

|                                                                  |          |
|------------------------------------------------------------------|----------|
| 1. Приложна електротехника. . . . .                              | 5,28 лв. |
| 2. Приложна радиотехника. . . . .                                | 5,28 „   |
| 3. Радиоприемници. . . . .                                       | 5,76 „   |
| 4. Радиоремонти. . . . .                                         | 6,76 „   |
| 5. Телевизия. . . . .                                            | 6,40 „   |
| 6. Хладилно дело. . . . .                                        | 3,00 „   |
| 7. Френски, немски, английски<br>език — първа година по. . . . . | 6,16 „   |
| 8. Френски, немски, английски<br>език — втора година по. . . . . | 7,49 „   |
| 9. Испански език — първа година. . .                             | 6,80 „   |
| 10. Испански език — втора година. . .                            | 7,20 „   |
| 11. Есперанто — първа година. . . . .                            | 5,28 „   |
| 12. Математика. . . . .                                          | 3,10 „   |
| 13. Физика. . . . .                                              | 2,90 „   |
| 14. Химия. . . . .                                               | 2,70 „   |
| 15. Биология. . . . .                                            | 2,50 „   |
| 16. Обща теория на счетоводството. .                             | 5,66 „   |
| 17. Селскостопанско счетоводство. .                              | 5,09 „   |
| 18. Домакинство, хранознание и<br>готварство. . . . .            | 5,28 „   |
| 19. Пчеларство. . . . .                                          | 5,47 „   |
| 20. Гъбарство. . . . .                                           | 6,10 „   |
| 21. Транзистори и магнетофони. . .                               | 6,60 „   |
| 22. Електроинсталаторство. . . . .                               | 5,76 „   |

Лекциите са разработени и пригодени за самостоятелно изучаване.

Същите са поместени в отделни свитъци, с всички необходими схеми и други обяснения за най-бързо усвояване на материала. Свитъците се изпращат последователно. След разучаването на учебния материал във всеки свитък се изготвя контролно упражнение, което се връща за преглед от нашите специалисти, те дават допълнителни указания и оценка на работата на курсиста.

Всеки курсист от София или тези, които пристигат в София, имат право на консултация по съставения график на ул. „Жданов“ 10 (безистена), тел. 67-09-29 и 87-89-47.

**GRAVA! URĜA!**

Letero aŭ poŝtkarto ĝuste nun povas efike kontribui por akiri Esperanto-programojn per tri novaj radio-stacioj por eksterlando. Amase skribu rekte al la respondeca direktoro petante radio-programojn en Esperanto pri la sveda popolo kaj lando: **S-RO B-JÄRREL, PROGR. DIREKTORO DE RS, S-105 10, STOKHOLMO, SVEDIO.**